

## "Letero de Sven Ziegler, la 8-an de marto 1988 al la redaktoro de la revuo "Esperanto"

*Rimarkigo:* La unuoblaj substrekoj indikas la parton de la teksto **efektive publikigitan** en "Esperanto", aprilo 1988, p. 76. La duobla substreko indikas la vortojn **ŝanĝitajn** de la redaktoro.

Por mi, kiu estis intima kunlaboranto de Prof. D-ro Ivo Lapenna dum deko da jaroj, kaj kiu konservis kun li tre amikajn rilatojn dum 30 jaroj, estas evidente, ke la nekrologa artikolo de Ulrich Lins en la februara numero de "Esperanto" nepre necesigas kaj ĝustigon kaj kompletigon.

Antaŭ ĉio mi estis profunde ŝokita pro la aluda kredigo sur paĝo 23, ke Ivo Lapenna estus iu (eksa?) stalinisto, kiu "kredeble" pro "kombinaĵo de personaj kaŭzoj kaj de malkontento pro la politika evoluo en la lando" forlasis Jugoslavion. Tiu ideo estas absurda por ĉiuj, kiuj konis la forpasinton. La aserto, por kiu estas donita nenia probabligo (por ne diri pruvon), estas des pli malfeliĉa, ĉar la mortinto ne povas respondi al ĝi.

Tute male, dum sia tuta agado Lapenna estis gvidata de sia firma kaj senkompromisa sinteno por la Internacia Lingvo kaj la humanismaj idealoj ligitaj al ĝi, inkluzive de la homaj rajtoj. Ĝis sia morto li vivis plene obee al tiuj ĉi idealoj. Li tion faris en Jugoslavio, kaj li tion faris i.a. en UEA. Kiam li opiniis tion necesa, li ne timis rompi ĉiajn ĝistiamajn ligitecojn, kiel konate eĉ je la risko de siaj vivo kaj bonoj. Tiel li agis en la milito kaj tiel li agis, kiam en 1949 li forlasis Jugoslavion. Sammaniere - cetere sen komparo - en 1974 en Hamburgo li decidis, ke lia agado por la menciitaj idealoj plej bone okazu en la Esperanto-movado ekster UEA. Li tiurilate bazis sin sur sia prijuĝo pri la karaktero de la "iom heterogena rondo", inkluzive de ĉiuj komitatanoj de orienta Eŭropo (p. 26). Oni povas diskuti, ĉu tiri tiun konsekvencon (tiu decido) estis ĝuste (a) aŭ ne, sed oni ne rajtas dubi pri tio, ke en plena honesteco li agis sole laŭ sia takso de la interesoj de la Esperanto-movado, por kiu dum la periodo 1974-87 li laboris per la sama energio kiel antaŭe kaj certe neniel "evoluate" rilate al la nomitaj fundamentaj principoj.

Pri lia agado kaj pri lia persono ĝenerale "Esperanto" konstante silentadis dum la menciitaj 13 jaroj. La nuna subita mencio, per nuraj kelkaj vortoj, en la nekrologo evidente ne sufiĉas por doni justan - senpartian - bildon pri lia agado dum tiuj jaroj. Sed ja ĉiu povas legi mem liajn verkojn ankaŭ el tiu periodo.

Sven Ziegler

Juĝisto Kopenhago, Danlando

(Nun, en 2004, Prezidanto de Alta Kortumo de Danio)

18.04.88

Subskribita Ziegler"